

Matthias Claudius,  
Vespera kanto

*tradukita de Manfred Retzlaff*

1. La luno nun leviĝis,  
La steloj eklumiĝis,  
Subiĝis jam la sun'.  
Silentas la arbaro  
Kaj super la kamparo  
Nebulo blanka kuŝas nun.

2. La mondo ŝajnas kiel  
Hejmeca ĉambro, tiel  
Trankvila estas ĝi.  
Dormante ĉiun penon,  
Aflikton kaj ĉagrenon  
Dum nokta hor' forgesu vi.<sup>2</sup>

3.) Jen staras ĉe l' ĉielo  
Tre eta fora stelo,  
Sed tamen egas ĝi!  
Ja estas ofte aĵo  
Por ni nur ridindaĵo;  
Ĉar ne videblas ĝi al ni.

4.) Ni homaj fieruloj,  
Mizeraj ni pekuloj,  
Malmulton scias ni!  
Ni faras multajn aĵojn  
Kaj artajn elpensajojn,  
Sed vana estas tio ĉi.

5.) La Dian savon vidu  
Ni nur kaj ni ne fidu  
je vanta iluzi'!  
Ni malfieraj iĝu,  
Ni ĝoju kaj piĝu,  
Infan-egalaj estu ni!

...

Matthias Claudius,  
Abendlied

1. Der Mond ist aufgegangen,  
Die goldnen Sternlein prangen  
Am Himmel hell und klar;  
Der Wald steht schwarz und schweiget,  
Und aus den Wiesen steigt  
Der weisse Nebel wunderbar.

Wie ist die Welt so stille  
Und in der Dämmerung Hülle  
So traulich und so hold!  
Als eine stille Kammer,  
Wo ihr des Tages Jammer  
Verschlafen und vergessen sollt.

2. Seht ihr den Mond dort stehen? -  
Er ist nur halb zu sehen  
Und ist doch rund und schön!  
So sind wohl manche Sachen,  
Die wir getrost belachen,  
Weil unsre Augen sie nicht sehn.

3. Wir stolze Menschenkinder  
Sind eitel arme Sünder  
Und wissen gar nicht viel;  
Wir spinnen Luftgespinste  
Und suchen viele Künste  
Und kommen weiter von dem Ziel.

4. Gott, laß uns dein Heil schauen,  
Auf nichts Vergänglich's trauen,  
Nicht Eitelkeit uns freun!  
Laß uns einfältig werden  
Und vor dir hier auf Erden  
Wie Kinder fromm und fröhlich sein!

...

---

<sup>2</sup> alia versio:

2.) Ah, kiel trankvileca  
La mondo kaj hejmeca  
Vespere estas ĝi!  
En tiu kalma paco  
Ekdormu vi pro laco,  
Forgesu la aflikton vi!

6.) Finfine vi nin prenu  
 El tiu mond', ĉagrenu  
 Ni ne pro tio ĉi!  
 Kaj kiam vi nin prenos,  
 Ho faru, ke ni venos  
 En vian regnon, kara Di'!

7.) Gefratoj, enlitiĝu,  
 Trankvile endormiĝu!  
 Noktiĝas ĉie ĉi;  
 Vin gardos nia Dio.  
 Li regas super ĉio.  
 Ĝis morgaŭ nun ripozu vi!

*Traduko de la Germana poemo "Abendlied" de MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21) en Esperanton de MANFRED RETZLAFF (\*1938-11-04) en 1989-09-10.*

MR-013-2 / Arg-394-777 (2007-03-26 13:19:45)

*Tiu ĉi traduko estas unue publikigita en 1984 en "Esperanto aktuell", numero 6/1984, la organo de Germana Esperanto-Asocio, sur la aldonaj "Flavaj paĝoj", paĝo 15. Enigis ka tekston de la traduko la tiama redaktisto d-ro Dirk Willkommen. Mi, Manfred Retzlaff, sanĝis en 2007-03-26 nur la duan strofon, kompare al la teksto aperinta en "Esperanto aktuell 6/1984".*

5. Wollst endlich sonder Grämen  
 Aus dieser Welt uns nehmen  
 Durch einen sanften Tod!  
 Und, wenn du uns genommen,  
 Laß uns in Himmel kommen,  
 Du unser Herr und unser Gott!

6. So legt euch denn, ihr Brüder,  
 In Gottes Namen nieder;  
 Kalt ist der Abendhauch.  
 Verschon uns, Gott! mit Strafen,  
 Und laß uns ruhig schlafen!  
 Und unsern kranken Nachbar auch!

*Verkinto de tiu ĉi Germana poemo estas MATTHIAS CLAUDIUS (\*1740-08-15 - †1815-01-21).*

Arg-394-776 (2012-12-24 20:31:03)

*La poemo estas kantebla laŭ melodio verkita de Johann Abraham Peter Schulz (31.03.1747 - 10.06.1800). Pri tiu vidu la retejon [http://de.wikipedia.org/wiki/Johann\\_Abraham\\_Peter\\_Schulz](http://de.wikipedia.org/wiki/Johann_Abraham_Peter_Schulz). Vidu ankaŭ: <http://ingeb.org/Lieder/DerMondi.html>. Tie estas aŭdebla la meolodio. La muziknotoj troviĝas en <http://www.liederprojekt.org/lied27783.html>.*